



# Komencanto

## Kiel tio komenciĝis

Memore al  
Aleksas Masiukas,  
prezidanto de E-klubo el  
urbo Murmansk  
Verda eseo

## Neelpensita historio

Infana interhelpo

## Verkoj de niaj legantoj

Io pri ĉevaloj  
Ĉaplin en Parizo  
Mallongaj fabeloj  
Originala novelo

## Gramatiko serioze kaj ŝerce

Proverboj  
por komencantoj  
Ankoraŭ pri stilo

## Humuraj paĝoj

Amuza rakonto  
Gajaj demandoj kaj respondoj  
Anekdotoj

## La praktiko + impresoj

Pollando invitas vin

## Konkurso "Enigmaj-2006"

Korespondu!  
korespondpetoj  
kaj anoncoj

Kononova Sneĵana [N.Omka, Rusio]



internacia revuo por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj

2006

septembro – oktobro

5 (61)

## Perantoj de "Komencanto"

Ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian revuon

- UEA** - Universala Esperanto-Asocio,  
Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ, Rotterdam, Nederlando
- Argentino** Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910  
- Correo Central. AR-1000 Buenos Aires.
- Aŭstralio** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson  
St., Redfern N.S.W. 2016
- Belgio** Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000,  
Antwerpen
- Brazilo** Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia  
(DF) - BR - 70084-970
- Britio** David Kelso, 5 Craighenhill Road, Carluke. ML8 4QT
- Ĉeĥio** Vladislav Hasala, A.Dvorĥka I, CZ-696 62 Strĥbnice
- Ĉinio** Ĉina Esperanto-Ligo, PO Kesto 825, CN-100037,  
Beijing
- Danio** Revuservo de Dana Esperanto-Asocio. Arne Casper,  
Bryggervangen 70, 4.tv. DK 2100 Kopenhago.
- Estonio** Virve Ernits, Villimaa 17 — 8, EE 93812, Kuresaare.
- Finnlando** Paivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando  
Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki
- Francio** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Ceri-  
saie, 75004, Paris.
- Germanio** Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrcr-Seeger-Strasse,  
9 D-55129 Mainz.
- Hispanio** Pablo Vicente Valero, adv. Obispo Quesada  
n=BA14, 6D, ES-40006, Segovia.
- Irano** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184,  
TEHRAN
- Italio** Itala Esperanto-Federacio, Via Villorresi, 38, 20143, Mi-  
lano.
- Italio, Kroatio, Slovenio** Viŝnja Brankoviĉ  
Via Leghissa 6, IT-34131, Trieste
- Irlando** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood,  
Dublin 6W
- Japanio** Japana Esperanto-Instituto, JP-162-0042, Tokyo-to,  
Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3
- Katalunio** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-  
08200, Sabadell
- Kubo** Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa  
11300, Havano
- Litovio** Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k.  
167.
- Norvegio** Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18,  
N-0572 Oslo
- Nov-Zelando** David Dewar, 4 Harlech Mews,  
Christchurch 8004
- Pollando** Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-  
137, PL-01-865 Warszawa
- Portugalia** Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joao Couto,  
N.6, R/C.-A, 1500 Lisboa
- Svedio** SEF, Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8,  
SE-242 35, Horby
- Svislando** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH —  
4224 Nenzlingen
- Usono** Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El  
Cerrito, California 94530, U.S.A.

### Karaj legantoj!

Ni ĉiuj kun vi estas esperantistoj. Kaj ni esperas, ke vi havas "nur pozitivajn spertojn de la E-vivo". Ĝuste tiel nomiĝas rakonto pri esperantistiĝo de Aleksas Masiukas, kies foton vi vidas ĉe la najbara paĝo. Aleksas Masiukas estis tre fervora adepto kaj entuziasto de la internacia lingvo kaj la Esperanto-movado. Dum multaj jaroj li gvidis E-kursojn, krome, aktive verkis kaj tradukis en Esperanto. Li estis fidela leganto kaj amiko de "Komencanto". eĉ estinte jam serioze malsana kaj dum lasta tempo ofte troviĝante en malsamulejoj, li de tie sendis leterojn kun siaj reagoj kaj kontribuajoj. Tiu ĉi historio pri liaj komencaj paŝoj en Esperanto jam kuŝis en la redakcia teko, kiam nin atingis la trista informo pri lia forpaso. Ve, nenio estas eterna sub la luno, sed pri bona homo restos bona memoro en la koroj de ĉiuj, kiuj konis lin. Memore al Aleksas ni publikigas ankaŭ lian spritain eseon pri la verda koloro.

Kiom gravas por ni impresoj, ricevitaĵoj en infanaĝo! Kiom forte orientas ili la tutan postan vivon. Ĝuste pri tiu temo estas "neelpensita historio" de Martin Ginette el Francio, jam bone konata al vi aŭtorino. La rakonton ornamas desegnita ankaŭ de ŝi bildo.

"Verkoj de niaj legantoj" estas la kerna rubriko kaj direkto de nia revuo. Ĉi-foje en ĝi denove estas kolektitaj diversgenraj verkoj: poeziaĵoj de Santi Elena Bullo el Italio kaj de la germana aŭtoro, kiu publikigis sub pseŭdonomo Cezar, du filozofiaj fabeletoj de S.Orbeliani, tradukitaj de nia malnova legantino kaj aŭtoro el Moskvo Zujeva Margarita. La fina parto de la novelo de Raita Pyhälä denove translokigas nin en la mondon de interrilatoj de Stefan kaj liaj proksimuloj.

"Proverboj por komencantoj" hodiaŭ tuŝas la temon de adjektivo, aŭ A-vortoj. Legu kaj ĝuu la freŝan proverban historion de Jean-Luko Tortel el Francio. Najbare kun ĝi situas "Ankoraŭ pri la stilo", facila kaj utila materialo por verkemuloj, sed ne nur...

Ĉe la humuraj paĝoj, krom la anekdotoj, estas humura parodia detektiva rakonto "La teroristo", esperantigita de Igorj Belousov kaj spritaj demandoj kaj respondoj de jam konata al vi Tatjana Vŝiveva. Ĉiuj aŭtoroj de tiuj paĝoj estas el Rusio.

Hejmaj taskoj al la lecionoj de "Vojaĝo en Esperanto-lando" de B.Kolker iĝis konkretaj rakontoj pri konkretaj temoj. Tereza Liberska el Pollando ricevis taskon "priskribi tiel vian landon, ke la leganto tuj ekdeziru viziti ĝin" kaj ni prezentas por via juĝo ŝian rakonton pri la amata hejmlando. La plenumantoj de tiaspecaj taskoj el "Vojaĝo..." estas ĝuste "komencantaj aŭtoroj", do, kategorio de esperantistoj, por kiuj ekzistas nia revuo. Tial bonvenon ĉiuj, kiuj perfektigas sian Esperanton per "Vojaĝo en Esperanto-lando"!

Konkurso "Enigmo-2006" daŭras, ni atendas viajn solvojn de la proponitaj taskoj. Ĉe la dorsa kovrilpaĝo ni denove memorigas al vi pri UK-92 en japana urbo Jokohamo, kiu atendos vian partoprenon!

Sukcesojn al vi kaj agrablan legadon!

# Komencanto

2006 numero 5 // (61) regule aperas ekde 1998

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev

~~konredaktas Raja Kudrjavceva~~

adreso: 620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Rusio

retpoŝto: [komencanto@r66.ru](mailto:komencanto@r66.ru)

abontarifo por 2007:

internacia tarifo: 18 eŭroj

orienteŭropa kaj latinamerika tarifo: 15 eŭroj;

aerpoŝta aldono 2 eŭroj


konto ĉe UEA: **vkud-a**

rusia tarifo: 200 rusiaj rubloj poŝtmandate al:

Кудрявцев Виктор Васильевич, 620041,

Екатеринбург, аб. ящ. 132.

Prezidanto de la Esperanto-klubo en urbo Murmansk (Rusio), aktiva esperantisto, kiu faris senlacaĵon, ĉiutagan laboron por Esperanto kaj E-movado: instruis en E-kursoj, tradukis kaj verkis en la internacia lingvo. Aleksas ĉiam estis neindiferenta homo, ofte la redakcio ricevis liajn leterojn kun la reagoj, proponoj kaj diversspecaj kontribuoj. Li estis el tiuj esperantistoj, sur kies entuziasmo baziĝas la Esperanto-movado en urboj kaj urbetoj en la tuta mondo. Rakonton pri esperantistiĝo de A.Masiukas la redakcio ricevis kelkajn semajnojn antaŭ lia forpaso, kiun kaŭzis grava malsano. Do, la rakonto aperas jam memore pri li. (la red.)



## ...mi havas nur pozitivajn spertojn de la E-vivo

Post longa tempo de persekutoj kaj prisilento, en multaj periodaĵoj aperis informoj pri Esperanto, la lingvo internacia, la lingvo de amikeco. Oni informis, ke venos esperantistoj el diversaj landoj, proponis organizi E-kursojn ktp. Tio estis komenco de renaskiĝo de Esperanto-movado en Soveta Unio.

Mi kun intereso legis tiujn informojn kaj sekvis la eventojn. Tamen mi ne havis rajton kontaktiĝi kun eksterlandanoj, ĉar mi lernis en milita akademio. Sed dum libertempo en Litovio post la festivalo mi aĉetis litovlingvan E-lernolibron de *Cieška kaj Petrulis* kaj kun la kraĵono en la mano trastudis ĝin. La lingvo plaĉis al mi. De la jaro 1960, kiam mi finis la akademion, kaj ĝis la fino de mia militservo en la jaro 1979 mi konservis ĝin en mia biblioteko. Bedaŭrinde poste mi ankoraŭ dum kelkaj jaroj ne havis eblon aliĝi al Esperantujo.

Sed jen alproksimiĝis centjariĝo de Esperanto. Kaj en la jaro 1987 servis en la sovetaj armeo en Murmansk soldato-maristo Dmitrij Lisenko, esperantisto el la urbo Voljskij, Volgograda regiono de Rusio. Li serĉis esperantistojn en nia urbo, sed ne trovis. Tiam li proponis al junulara kultura centro organizi E-kurson en Murmansk. En nia loka ĵurnalo "Polarnaja pravda" (*Arktika vero*) aperis artikolo pri Esperanto kaj anonco pri ebla E-kurso, kiun pretis ekgvidi samurbanino de D.Lisenko Elvira Gacenko. Pasis iom da tempo kaj la kurso okazis februare de la jaro 1988. Ankaŭ mi aliĝis kaj denove ekuzis la lernolibron de *Cieška kaj Petrulis*. Mi estis ununura lernanto en la grupo, kiu havis lernolibron.

Elvira dum du semajnoj vespere instruis nun kaj la 25an de februaro 1988 ni kunvenis por solene fini la kurson kaj fondi E-klubon. Baldaŭ Elvira forveturis kaj ni devis agi memstare. Ni elektis prezidanton Dmitrij Bubnov, kiu finis la kurson

kune kun mi, informis SEU (Soveta E-Unio) pri la nova klubo, mendis necesan literaturon kaj ekagis. Sed ĉu longe funkcius E-klubo sen la instruado kaj perfektigo de E-konoj?

Okazis, ke inter la novbakitaj esperantistoj plej pretis ekgvidi E-kurson mi. Efikis tio, ke mi fakte jam estis konata kun kvin lingvoj. Kaj dum lastaj 15 jaroj la kurson gvidas mi.

Mi ekkorespondis kun esperantistoj el multaj landoj kaj havis bonajn amikojn fakte en ĉiuj kontinentoj. Mi memoras, ke la unuan leteron mi skribis al amikino, kies adreson donis Elvira, fine de la unua instrusemajno. Mi strebis starigi ligojn kun la esperantistoj el ĝemelaj urboj de Murmansk. La unua estis E-klubo de nederlanda norda urbo Groningen. Poste mi trovis esperantistojn en Rovaniemi, ĝemela urbo en Finnlando. Dum multaj jaroj ni korespondas kaj eĉ reciproke interŝanĝis vizitojn. Ĝuste Marja-Liisa Parpala el Rovaniemi helpis nin aliĝi al UK en Tampere 1995. Eĉ nia estinta prezidanto Anatolij Luĉ poste iĝis ŝia edzo. Do ni havas ankaŭ parencon ligan! Nun ili transloĝiĝis al Kouvola, pli suda finna urbo.

Mi kontaktis kun esperantistoj ankaŭ el ĝemelaj urboj Jacksonville (Usono), Szczecin (Pollando), Vadso kaj Tromso (Norvegio), Luleo (Svedio) kaj eĉ Akureyri (Islando). Tio estis tre interesaj kontaktoj. Same kiel tiuj kun ĉiuj miaj E-amikoj. Miaj amikoj subtenis min, neriĉan ruslandan pensiulon, dum UK-oj en Berlin kaj en Vilno. Kaj nun mi planas partopreni en UK-91 en Florenco. Kaj denove miaj amikoj iom subvencias min. Ja kongresumado multe kostas.

Sed la plej gravan helpon de miaj E-amikoj mi ricevis post la operacio en onkologia kliniko. Mi konvinkiĝis kiom helpemaj estas esperantistoj. Do, mi havas nur pozitivajn spertojn de la E-vivo.

**M**i estas Aleksandras Julius Masiukas, prezidanto de Murmanska Esperanto-klubo "Murmano". Kion signifas *Murmano*? Tio ne estas ano de iu *Murmo*, ne. Tio estas neformala nomo de nia regiono, nomo de ĉirkaŭantaj nian regionon maroj. Ĉi nomon al la klubo donis la unuaj klubanoj kaj ĝis nun ĝi restas.

Mi naskiĝis en malgranda litova vilaĝo Zosina, 50 km for de la litovia ĉefurbo Vilnius. Kaj mi estas litovo. Vere fakte du lingvojn mi konsideras gepatraj: la litovan kaj la polan, ĉar ambaŭ estis parolataj en nia familio. En nia vilaĝo plimulto da loĝantaro hejme parolis pole, sed en la lernejo oni instruis litove kaj en ĉiuj oficejoj la laborlingvo estis la litova. Sed tio ja ne estas grava en mia rakonto.

Tio nur signifas, ke dulingvecon mi spertis ekde l' infanaĝo. Poste mi lernis en la mezlernejo, kie estis instruataj la litova, la germana, la rusa kaj eĉ la latina lingvoj. Kvar lingvoj! Tio povis bone helpi dum la lernado de Esperanto. Do, al la temo!

En la jaro 1955 mi eklernis en Milita Akademio en Moskvo. Proksimiĝis vaste diskonigita tutmonda festivalo de studentoj kaj junularo, kiu okazis en Moskvo en la jaro 1957.

*Tio ĉi estas la lasta teksto, kiun Aleksas Masiukas sendis por aperigo en "Komencanto".*

**Aleksas Masiukas** [Murmansk, Rusio]

## Verda eseo

*Dum ĉiu Esperanto-aranĝo okazas interesaj kaj neforgeseblaj eventoj. Unu el ili restis en mia memoro.*

Antaŭ pli ol 10 jaroj, dum BET (Baltia Esperanto-Tendaro) en Tartu (Estonio) la seminarion por la Esperanto-instruistoj gvidis la vaste konata esperantisto Boris Kolker. Foje li proponis al ni trovi kiom eble pli multajn vortojn aŭ vortkombinojn kun la radiko VERD-. Kiom da seriozaj, ŝercaj kaj gajaj variantoj aperis tiam!

Poste mi gastis en Tallin ĉe mia amiko. Estis belega somera vetero kaj mi kun plezuro promenadis vespere laŭborde de la golfo preter verdaj salikoj. Kaj en miaj oreloj eksonis delonge konata bela kaj melodia rusa kanto de la komponisto Ponomarenko "Ivuška zeljonaja" = "Saliko verda". Kaj la sunsubiro estis verdeta.

Poste mi tralegis, ke dum la navigado maristoj fojfoje spektas dum la sunsubiro maran ekbrulon de verdaj radioj. Mi rememoris la seminarion. Do kio povas esti verda? Mi ne estas poeto, sed ial facile laŭ muziko kaj motivo de tiu kanto "Ivuška" aperis la "verda" kanteto. Jen estas ĝi:

*Verda sunsubiro super verda val',  
Verde korsopiras verda najtingal'...  
Vere verda verdular' verde kantas en tendar'.  
Diru, verda verdstelanar', ĉu verdas ankaŭ mar'?*

*Verda saliketo verdas ĉe l' river',  
Verdan rivereton kaŝas verda ter'.  
Verda amo, verda stel', verda luno en ĉiel'...  
Verde diru, ho verda lin', ĉu amas verdulin'?*

*Verda lino diris verde al verdul',  
L' verdulin' foriris kun neverda ul'...  
Verdaj sentoj iĝis for, ne plu amas verda kor',  
Restis nure verda angor' kaj verda kordolor'.*

Samjare, eĉ samsomere, mi montris ĝin dum la medicinista konferenco en Kaŭnas kaj ĝi plaĉis al multaj. Poste, jam norde, rememoriginte la polan kanton pri soldato, kiu marŝante trovis la perditan amantan koron de iu junulino, mi aldonis:

*La verdul' ne kredis al la verda lin' -  
Eble koron verdan perdis verdulin'?  
Trovis koron la verdul', kaj eĉ sen neverda ul'...  
Jen feliĉa la verdulin' denove kisas lin.*

Sed ni ekrigardu, kion oni nomas verda en la rusa lingvo. Unuavice temas pri ĉio nature verda: verda saliketo, verda abieto, verdaj kampoj kaj arbaroj ktp. Sed estas ankaŭ verda tablo - kutime verde kovrita tablo por la kartludado. Verda lampo estis literatura societo en Sankt-Peterburg, kiun inter aliaj partoprenis ankaŭ la fama rusa poeto Aleksandr Puŝkin. Sed kial verda? Mi ne sukcesis ekscii. Ni foje aĉetadas verdan teon (ĝi vere donas verdan infuzajon), verdajn pizojn, pomojn... Multaj rusaj urboj havas verdan radikon: Zelenograd, Zelenogorsk, Zelenodolsk..., Zelenij mis (Verda kabo, kiel Cape Vert en Suda Afriko).

Oni povas iĝi verda pro ĵaluzo (aŭ pro kolero), kaj la plej enua enuo nomiĝas en la rusa zeljonaja toska = la verda enuo.

Nun vaste konata estas la verda movado, aŭ verduĵoj. Ilia celo estas ekologio kaj defendo de naturo.

Verdaj, do nematuraj, povas esti ne nur pomoj aŭ ĉerizoj, sed ankaŭ la homoj. Molodo-zeleno = juna kaj verda (tiel oni diras pri junularo, precipe se iu agas adoleskece.


Mi rememoris ankaŭ la rusan vortludon:

Iu aĉetanto en bazaro demandas:

- Ĉu tio estas ruĝaj riboj?
- Jes,- respondas la vendisto.
- Kial do ili estas blankaj?
- Ĉar estas verdaj. (Do, nematuraj).

Sed al mi plej plaĉas la rusa ekkrio ĵolki zeljonije! (abietoj verdaj). Ĝi esprimas kaj la miron, kaj ravon, domaĝon, ĉagrenon aŭ embarason.

*El la blanka pro neĝo dum preskaŭ tri kvaronoj de la jaro (dum la nokto polusa, nia longa vintro!) kaj verda dum blankaj, eĉ sunaj noktoj somere, norda marhaveno Murmansk.*  
via A. Masiukas



Všivceva Galina [Miass, Rusio]

Ginette Martin [Saulxures/Moselotte, Francio]

# Infana interhelpo

Okazis evento en mia juneco, kiu certe orientis forte mian vivon, kaj mi deziras rakonti ĝin al vi:

Mi aĝas 11 jarojn kaj mi ĝuas la somerajn feriojn. Mi vivas en modesta kvartalo, kie la familioj ne estas tre riĉaj, sed tre amikaj kaj helpemaj. Iun tagon, la najbaraj infanoj vokas min kaj mian fratino:

– Ginette! Marie-Jeanne, venu ludi kun ni!

– Ni ne povas, hodiaŭ ni devas porti la hejt-lignon al la subtegmento!

– Do ni helpos al vi!

Kaj tuj la grupo da infanoj en nia domo, kaj nia patrino kiu disdonas korbojn, kaj tiuj, kiuj ne ricevas korbon portos la ŝtipetojn sur la brakoj. Kaj jen ni, petola trupo de sep aŭ ok infanoj en la ŝtuparoj, kiuj supreniras, malsupreniras galopante, la grimpantoj renkontas la malgrimpantojn, kaj ridoj, kaj ĝojaj bruoj en la malnovaj lignaj ŝtuparoj, kiuj tremas. Kiel rapidas la laboro hodiaŭ! La ŝtipoj ŝajnas duoble malpli pezaj! Kiom da ligno ni portis al la subtegmento? Mi ne plu memoras, certe por vintro en nia montaro ni bezonis almenaŭ 6 aŭ 7 kubajn metrojn da ligno. La laboro mirakle rapidas, poste mia patrino regalas la tutan infanaron per pano, konfitaĵo, kaj akvo kun siropo.

Kaj la morgaŭan tagon, mia fratino kaj mi vokas la junajn najbarojn:

– Bernadette, Agnès, Simone, venu ludi kun ni!

– Ni ne povas, ni devas porti la porvintran lignon al la subtegmento!

– Ho, ni helpos al vi!

– Mi helpos, diras Jeannot, knabo de alia familio.

Kaj jen denove la sama sceno ĉe la najbarino, kaj la sama plezura kuna laboro, kaj kiam la najbarino regalas nin per manĝaĵo kaj trinkaĵo, ŝia konfitaĵo ŝajnas al mi multe pli bona ol tiu de mia patrino. Ha, labori ĉe la najbarino estas pli plaĉa ol labori ĉe si!

Kaj la tria tago:

– Jeannot, ĉu vi venas ludi kun ni?

– Mi ne povas, mi devas porti la lignon al la subtegmento!

– Ne ĉagreniĝu, ni venas!

Denove la tuta skipo da infanoj laboras kune, kaj ĉiuj ricevas la bonan panon ŝmiritan per alia konfitaĵo, kaj la trinkakvo estas kun alia siropo. Vere ni malkovras ĉiujn kuir-talentojn de la patrinoj de la kvartalo. For la tro konatajn konfitaĵojn! Eĉ la pano ŝajnas pli bona!

La miraklo estas, ke tiun infanan interhelpon neniu plenkreskulo sugestis al ni, ni spontane faris.

Certe pro la fakto, ke mi travivis tion, ĝi restis por mi ideo pri ideala socio, kiun mi konservis en la menso dum mia tuta vivo. Ne ĉiam ĝi okazis, sed ĝi restis la konstanta idealo atingenda, kaj mi certe renkontis ĝin konkrete plurfoje. Interhelpo estas kiel amo, kiam oni renkontas ĝin unufoje, oni ĉiam esperas retrovi ĝin, kaj de tempo al tempo la miraklo okazas.

Kiel diris iu ĵurnalisto en televido: “Ne tro gravas perdi amon post kiam ni spertis ĝin, plej gravas ke ni iam spertis ĝin. Kiu neniam spertis ĝin estas en malesperiga situacio.”



bildo de Ginette Martin [Saulxures/Moselotte, Francio]

**Santi Elena Bullo** [Mestre, Italio]

*Jam estis menciita antaŭe, ke nia malnova legantino kaj aŭtorino S.E.Bullo ne nur originale verkas en la internacia lingvo, sed ŝi ankaŭ estas profesia pentristino, kies bildoj havis personajn ekspoziciojn en Italio. Sian poemon pri ĉevaloj S.E.Bullo aranĝis per sia propra samtema bildo.*



Santi Elena Bullo [Mestre, Italio]

## Io pri ĉevaloj

Estas jam nova tago  
kiam iu malfermas la pordon  
de via ŝtalo, ĉevalidoj.  
Ek, antaŭ vi estas  
libera, bela kuro  
en la granda herbejo!  
Molaj herboj karesas  
viajn etajn piedojn.  
Viaj nazetoj prenas la aromojn  
kiuj el la aero forfuĝas.  
Domaĝe! Tian belan kuron fine  
stopigas griza metalfadeno.

## Kiam

Kiam falas obskura nokto  
ekdormas la familianoj  
kiuj multe tage laboris.  
Nur junulo maldormas.  
En la libroj li volonte legas;  
sur blankaj folioj siajn pensojn li skribas.

Malgranda kato kiu ronronas  
sur la malnova tapiŝo  
estas nure lia viva kompanio.

**Cezar** [Altenburg, Germanio]

## Ĉaplin en Parizo

Kara mimo en Parizo,  
Ĉaplin sur la strato,  
mi por vi poemon skribas  
kiel via frato.

Mi de vi nenion scias,  
eĉ ne aŭdas vorton,  
sed amiko. mi admiras  
vin kaj vian forton.

Homo rara vi ja estas,  
pantomima grando,  
kun melono sur la kapo  
belo de la lando.

Via mondolingvo gesta,  
via palpebrumo,  
montras, ke la homo estas  
pli ol nur kostumo.

Kiel vi la kisojn jetas  
en pariza parko,  
tio estas majstroverko  
ne de iu ŝarko.

Tio estas ja mesaĝo  
el pli bona mondo,  
mi vin dankas, kamarado,  
tramp' kaj vagabondo.

Restu forta, mi deziras.  
kontraŭ la detruo,  
per silento el la koro,  
meze de la bruo.



Sultan Saba Orbeliani (1658-1725)

Esperantigis Zujeva Margarita  
[Moskvo, Rusio]

## Caro kaj pentristo

Iu caro estis blinda je unu okulo. La caro havis lertan pentriston. Kaj iun tagon la caro ekvolis iel distri sin kaj vokis la pentriston.

– Mi deziras, - ordonis li, kiam la pentristo venis, - ke vi pentru mian portreton, kiu precize similos min.

La pentristo pensis:


“Jen venis fino al mi. Se mi pentros la caron unuokulan, li min ekzekutos.

– “Kiel vi kuraĝis prezenti min unuolkula?!” – indignos li.

Se mi prezentos lin vidpova je ambaŭ okuloj - li forhakos la kapon de mi, ĉar konstatos: “La portreto ne similas al mi!..”

Kaj la pentristo trovis tian elemparasiĝon: li pentris cervon, enmanigis al la caro fusilon, fermis al li nevidpovan okulon, kvazaŭ la caro celas, finpentris la portreton kaj portis ĝin al la caro.

Rezulte la caro ne trovis kialon riproĉi la portretiston kaj li saviĝis!



Izmajlova Luiza [Kuzneck, Rusio]

## Lupo kiel forĝisto

Foje lupo atakis azenon kaj volis ĝin manĝi. La azeno diris al la lupo:

– Kara lupo, vi certe manĝos min, sed bonvolu plenumi mian lastan deziron: en mia hufo enŝtopiĝis peceto de pajlo, eltiru ĝin, mi petas.

La lupo malfermis la faŭkon kaj tiriĝis al la piedo de la azeno, kie “estis” la peceto. La azeno kalcitris per ambaŭ piedoj kaj elbatis al la lupo dentojn. Tiel la lupo ne povis formanĝi la azenon.

Pyhäälä Raita  
[Lestijärvi, Finnlando]

## La du edzinoj

*Daŭrigo. Komenco en "K"-4*

Nur Stefanon premis la frakasa memoro pri la unua provo de familia vivo. Li absolute ne volis edziĝi duan fojon, ligi sin per ceremonioj kaj juroj, kies nuligado povus esti same freneziga kiel la unua divorco. Tamen al la bebo li ne rifuzis sian patrecon. Li ekloĝis kune kun la ĝojplena Rigia. Mirige estis, ke la bebo naskiĝis ĝuste samtage kaj sammonate kiel lia unua filo antaŭ dudek du jaroj. La duonfratojn dekomence kunigis tiu magia koincido.

Neniu povis antaŭvidi la reagon de Rigia. Ŝi furioziĝis. Ŝi ja estis kredinta sin la ĉiama kaj sola virino de Stefan, malgraŭ la divorco, je kiu ŝi mem insistis. Nun ŝi sentis sin profunde ofendita. Ŝi malamis Rigion kaj la bebon. Ŝi kalumniis ŝin kaj sendis al ŝi galajn leterojn dum la gravedeco. Ŝi vizitis la bankon de Rigia, ofende ŝrikante kaj akuzante ŝin, ke ŝi delogis Stefanon, la patron de la infanoj de Rigia. La kolegoj de Rigia povis nur gapi kaj finaŭskulti. Kaj Rigia? Ŝi ne defendis sin, ŝi nur ploris, ploregis, kaj post la labortago hejmeniris atendante konsoladon de Stefan kaj la bebo. Dume Rigia sentis sin humiligita antaŭ la tuta vilaĝo, antaŭ siaj kolegoj, antaŭ siaj lernantoj. Kun la gefiloj ŝi baldaŭ translokiĝis en alian urbon kaj ekhavis postenon en tiea lernejo, sed tie ŝia kariero ne brile evoluis. Ŝi maljuniĝis kaj komencis malsaneti. Ŝi ne plu estis la bela instruistino plej

proksima al la adoleskantoj. Ŝajnis, ke neniu plu rekonis ŝian profesian valoron.

La kuna vivo de Stefan kaj Rigia ne daŭris pli longe ol lia unua geedzeco. Li estis nefacila kunulo. Kun la jaroj revenis la tentoj de alkoholaĵoj, la malsamopiniado, la kvereloj pri mono kaj pri la edukado de la fileto. La kalumnioj kaj akuzoj de Rigia, la malfacilaĵoj en la familia vivo, la senlaboreco kaj senĉesa fumado de Stefan, la pliiĝanta manko de mono roniĝis la esperojn. Fine ankaŭ Rigia ekpensis, ke vivo sen Stefan estus pli eltenebla kaj sekura ol kun li. Ŝi petis la viron translokiĝi. La fileto restu, li ja havis ŝian familian nomon, ne tiun de la patro, kaj la etulo al ŝi estis tre kara. Ŝi deziris eduki lin sola, protekti lin de troa influo de la patro, kiu tamen rajtis pasigi ĉiun duan semajnfinojn kun la knabo.


Pro la knabo Stefan aliĝis al Anonimaj Alkoholistoj. Li sincere volis fariĝi pli bona patro.

aminda hundeco helpis al lia sobriĝo.

Al la filo li montris kaj instruis, ĉion kion li sciis fari: atenteme vagi en la kampoj kaj arbaro, kultivi fragojn kaj abelojn, bredi trutojn, sportadi, ludi glacihokeon, esti malferma kaj komprenema al aliaj homoj.

Ne ĉion la infano tuj komprenis, sed li vidis, ke la mondkonceptoj de paĉjo kaj panjo multe diferencis. Paĉjo donis al li pli da libereco, pli da aventuroj; panjo donis al li sekurecon, purajn vestaĵojn kaj senliman dorlotan amon. La knabo ne sciis elekti, kiun imiti.

Subite frapis malsano Stefanon. Li de kelka tempo havis simptomojn, kiujn la kuracisto misinterpretis. Poste evidentigis, ke li havas agresivan kanceron en la ventro. Ĉu nekuraceblan? Tri el liaj AA-klubaj amikoj jam mortis pro tia malsano en kelkaj monatoj. Ĉu ankaŭ li mortos? Kiom rapide? Li al neniu montris sian terurigon. La doloroj kreskadis, la kuracistoj ne sciis, kion fari, aŭ eble ili jam sciis, ke nenio estis farebla.



Bill Thorne [Londono, Britio]

Li prenis al si nigran petol-eman hundidon, kiu per sia



Ili provis nur mildigi la suferadon de la paciento, kiu mem esperis, revis pri tempo pasigota kun la pli juna filo, kun ĉiuj homoj al li karaj.

En du monatoj li tute malfortiĝis, sed li ne volis kredition. Lia animo vivis en la futuro, kiun li imagis sana. Pro la morfin-injektoj li ne plu sentis grandajn dolorojn. Li preĝis al Dio kaj decidis fariĝi tute alia viro. Li eĉ ĉesis fumi. Kioma fojo tio jam estis? Ne gravis, nun li sciis, kio vere plej gravas en la vivo: la infanoj, la proksimuloj, la homaj rilatoj.

Li jam aspektis dudek jarojn pli aĝa ol antaŭ du monatoj, sed li ne kredis la spegulon. Li kuraĝe asertis al la vizitantoj, ke li resaniĝos, kaj per rulseĝo ili rondpuŝadis lin en la parko, kie jam sentiĝis la printempo kaj baldaŭ verdiĝos la betuloj. En lia animo ĝermadis novaj planoj, kvankam li sola apenaŭ povis ellitiĝi.

Per sia rara kapablo sorĉi per vortoj li sukcesis ridigi siajn samĉambranojn, flegistinojn kaj vizitantojn. Neniu el ili povis vere kredi, ke li baldaŭ mortos. Antaŭ ĉiuj li kaŝas sian angoron.

Kial Rigja ne venas? Stefan ŝatus vidi ĉirkaŭ sia lito la du edzinojn kaj ĉiujn siajn gefilojn. Li petegas, ke ili venu kune... ke la edzinoj paciĝu. Li deziras esti pardonata kaj ne lasi konfliktojn kaj amarecon inter siaj familianoj. Li deziras manpremi kun ĉiuj siaj karuloj, adiaŭe. Por li Rigja ne estas konkubino, kiel ŝi mem imagas, kvankam li ne edzinigis ŝin. Li atendas. Telefonadas. Rigja daŭre rifuzas veni. Ĝus estis enterigita ŝia amata patro. Ŝi ne povas akcepti, ke povas esti ke ankaŭ Stefan ne sariĝos. Ŝi prokrastas la viziton, ŝi devas helpi al sia patrino jam



Terjohina Maria [Moskvo, Rusio]

iom demenca. Neniu kaj nenio povas devigi ŝin viziti Stefanon nun. Ŝi simple ne havas forton fronti al dua mortanto. Ŝi estas ĝisfunde skuata, senkonsola pro la perdita patro. Ŝi venos, kiam ŝi retrovos animan balancon, kaj ĝis la fino ŝi esperas, ke Stefan estos rehejmenigata kaj ili povos kune kaj trankvile paroli pri ĉio sen la ĉesto de aliaj parencoj.

En bela junia mateno kviete kaj sola mortas Stefan, ĝuste en sia 60 naskiĝtago, sen vidi la paciĝon de la du edzinoj. Rigja ne povas enmanigi al li la gratulkarton, ĵus desegnitan de la filo. Ĉe lia mortolito ŝi renkontas Rigjan, kiu pasigis la lastan nokton maldorme apud Stefan kaj, nesuspektante la baldaŭan morton, deziris iom

ripozi antaŭ la hospitala matenmango.

Neesprimeblaj ĵaluzo kaj rimorso atakas Rigjan. Ŝi restas senvorta, pro la fortaj sentoj ŝi apenaŭ povas stari. Ho, kial, kial ŝi ne venis pli frue? Al ŝi ŝajnas, ke la unua edzino priŝtelis la lastajn horojn de la vivo de la amato. Amato? Jes! Kvankam neniu el ili toleris Stefanon, kiam li estis viva, ili nun komprenas, kion ili perdis. Ili rivale amis la viron. Ili silentas. Post la longa silento Rigja etendas sian manon kaj malpeze tuŝetas la brakon de Rigja. Sur la sulketaj vangoj briletas brulaj larmoj. Rivali ne plu indas. Inter ili, sur la senmova brusto de Stefan, blankas bukedo de sovaĝaj konvaloj, kiujn portis al sia patro hieraŭ la tri gefiloj kune.




Izmajlova Luiza [Kuzneck, Rusio]

Karaj legantoj! Jen estas la vica serioza kaj amuza leciono de Johan'-Luko Tortel, per kiu vi povos lerni multon novan.

Johan'-Luko Tortel [Le Belvedere, Francio]

## Proverboj por komencantoj



**Aĝo tro matura ne estas plezura (5)**

Ni memoru, ke en nia Esperanto ĉiu vorto kun fino en -A (matura, plezura) plej-ofte klarigas, precizigas alian vorton kun fino en -O (aĝo) indikante apartenon, econ, kvanton, rilaton, posedon, ktp. Ĝin oni nomas: a-vorto, aŭ ankaŭ: adjektivo. Tiu vorto de-venas el latina preskaŭ simila vorto, signifanta "al-don-ita por komplet-igo".

Ĝi povas preni la indik-ilon -J :

**Al grandaj sinjoroj grandaj honoroj (29)**

Aŭ la indikilon -N:

**Altan arbon batas la fulmo (62)**

Aŭ ambaŭ:

**Gasto havas akrajn okulojn (651)**

Sed ĝi ne ŝanĝiĝas kun la sekso: bela ĉevalo, bela ĉevalino.

Ni esperantistoj ofte ne konscias kiel mirinde simpla - kaj do kiel mirinde efika - estas tiu nur-a aldono de -A; ni komparu kelkajn adjektivojn en Esperanto kaj en kelkaj latin-idaj lingvoj:

Vorto komuna al Esperanto kaj al kelkaj latinidaj lingvoj	Adjektivo en Esperanto	Adjektivo en kelkaj latinidaj lingvoj
<b>Natur'</b>	<b>natur-a</b>	<b>natur-al'</b>
<b>Venen'</b>	<b>venen-a</b>	<b>venen-os'</b>
<b>Fragment'</b>	<b>fragment-a</b>	<b>fragment-ar'</b>
<b>Gigant'</b>	<b>gigant-a</b>	<b>gigant-esc'</b>
<b>Kub'</b>	<b>kub-a</b>	<b>cub-ic'</b>
<b>Pac'</b>	<b>pac-a</b>	<b>pac-ific'</b>
<b>Alp'</b>	<b>Alp-a</b>	<b>Alp-in'</b>
<b>Religi'</b>	<b>religi-a</b>	<b>religi-os'</b>

Ni imagu, se Ĉinoj, Koreanoj, Japanoj... devus lerni -al, -osa, -ari, -esc, -ic, -ific, -in, -os... (kaj la listo ne plenas) anstataŭ simple -a! Kaj lerni estus nenio: sed kie-n meti ilin? Kial natur-al kaj venen-osa, kaj ne inverse? Ne-memor-ig-eble! Kaj tio etendiĝas al aliaj A-vortoj, ekzemple:

<b>Un'</b>	<b>unu-a</b>	<b>prim'</b>
<b>Du'</b>	<b>du-a</b>	<b>secund'</b>
<b>Tri</b>	<b>tria</b>	<b>terti'</b>
<b>Kvar</b>	<b>kvar-a</b>	<b>quart'</b>
<b>Kvin</b>	<b>kvin-a</b>	<b>quint'</b>

Tio memorigas al ni, ke ni ne imitu niajn naciajn lingvojn, kaj ekzemple ne uzu por adjektivo: -ik, anstataŭ simple: -a :

Baz-a sed ne \*baz-ika (\* indikas eraran vorton)  
 Torak-a sed ne \*torak-ika  
 Sporad-a sed ne \*sporad-ika  
 Diabet-a sed ne \*diabet-ika, ktp.

**Akvo kura, akvo pura (9).**

Hm! Ĉu tio veras? Pura signifas: sen makulo, sen difekto, kun neto; ne nur pri aferoj videblaj aŭ tuŝeblaj (pura akvo, pura oro) sed ankaŭ pri ideoj: pura vero, pura senco.

**Aŭ ĉio, aŭ nenio (130)**

"Aŭ" du-oble uzata indikas unu solan elekt-obl-econ inter du prezentaĵoj:

**Aŭ festo, aŭ fasto (132).**

Fasti signifas ne manĝi, ne nutri sin; do mal-sati; malagrabla, ĉu ne?

Cetere:

**En malsata familio mankas harmonio (510)**

Ni scias, ke MAL- indikas la kontraŭon, je pli intensa nivelo, ol NE-: malbona estas pli "forta", ol nebona. Sed ni ne konfuzu (denove sub la influo de niaj naciaj lingvoj) MAL- kun MIS-. MIS- indikas eraron, ne-konvenon; mis-kompreni ne estas mal-kompreni, sed erare kompreni. Infano mal-ĝentila ne estas mal-edukita (kio ne havus sencon) sed mis-edukita, aŭ ne-edukita. Nia ebla eraro estas des pli facila, ke -MIS- ofte portas la ideon: malbone fari; ekzemple mis-spiri ne estas mal-spiri (kio ne havus sencon), sed malbone spiri, anheli.

Ni kelk-foje arogas, ke Esperanto estas facila; eble jes, kompare kun la naciaj lingvoj; sed ni pli ĝuste diru, ke ĝi estas subtila!

Jen por fini kelkaj spritaj proverboj:

**Kred-eble al putoro plaĉas propraodoro**

**Ne dungu ezokon por varti salikokon**

**Unu bakas, lavas, flikas; dua sidas kaj ... kritikias**

Ĉu vi rimarkis, ke ili ne havas numeron? Ĉar ili ne apartenas al la Zamenhofa Proverbaro, sed al la libro de Marjorie Boul-

ton [marjri bultn] "Faktoj kaj Fantazioj". Tre interesa, distra kaj leg-inda libro por komencantoj. Cetere, ĉiuj libroj de Marjorie Boulton, fama esperanta verkistino, estas nepre legindaj. Ŝi antaŭ ĉio estas poetino, kun kor-tuŝaj kaj samtempe humuraj sentoj, kun brila kaj facila stilo. Por kutim-iĝi al bona lingvo-stilo ni nepre legu Marjorie Boulton. Lastan fojon ni citis Raymond Schwartz [remoŝvarc] - ni same legu ĉion eblan de li, unu el niaj plej lertaj kaj spritaj verkistoj.

*Ĝis la venonta fojo, ni fartu bone! Johan' - Luko*

*Esperable, tiuj ĉi fragmentoj el la verko de Henrik Seppik "Stilo" el libro "La tuta Esperanto" estas utilaj ne nur por verkemuloj, sed ankaŭ por dezirantoj bele kaj klare paroli esperante.*

## Ankoraŭ pri stilo

**S**tilo estas nomata la maniero, en kiu oni esprimas siajn pensojn. Kiel memstara kaj vivanta lingvo Esperanto havas kompreneble sian propran stilon. Kio do estas la esperanta stilo? Tiun demandon D-ro Zamenhof respondas jene (Lingvaj Respondoj): "La vera stilo Esperanta estas nek slava, nek germana, nek romana, ĝi estas - aŭ almenaŭ devas esti - nur stilo simpla kaj logika." Kio do estas logika, simpla kaj klara, tio estas bona, kio estas nelogika, komplikita kaj malklara, tio estas malbona, kvankam oni eble ne pekas kontraŭ gramatikaj reguloj.

Por havi bonan, elegantan kaj internacian stilon, oni devas bone koni la lingvon kaj ĝian spiriton, oni devas havi la kapablon pensi logike kaj rektlinie kaj oni ne rajtas blinde imiti sian gepatran lingvon. Ĉiu homo tiel kutimiĝis al sia gepatra lingvo, ke al li ŝajnas, ke ĝi estas el ĉiuj lingvoj la plej natura, la plej logika kaj la plej bona. Sed fakte ĉiu nacia lingvo svarmas je nelogikaj kaj sensencaĵoj, kiuj estas nekomprenablaj kaj ofte eĉ ridindaj por eksterlandano; ĉar neniua nacia lingvo sekvas la rektajn vojojn de la racio kaj logika pensado, sed nur tiujn de la tradicio kaj kutimoj. Tiaj nelogikaj kaj laŭforme absurdaj esprimoj estas nomataj *idiotismoj*. Ĉiu nacia lingvo havas siajn proprajn idiotismojn, kiuj ne estas laŭvorte tradukeblaj al aliaj lingvoj. Por ilustro ni prezentas ĉi-sube laŭvortajn tradukojn el kelkaj lingvoj.

**Estona:** "Kiel la mano iras?"  
**Finna:** "Kiel vi povas?"  
**Rusa:** "Kiel la aferoj?"  
**Germana:** "Kiel ĝi iras?"  
**Franca:** "Kiel vi portas vin?"  
**Angla:** "Kiel faras vi faras?"  
**Itala:** "Kiel vi staras?"  
**Sveda:** "Kiel staras ĝi al?"  
**Ĉeĥa:** "Kiel vi havas vin?"  
**Norvega:** "Kiel vi trovas vin?"  
**Hungara:** "Kiel vi estas?"



Kononova Svetlana [Kackamar, Rusio]

Malgraŭ la malegaleco de la formo ili ĉiuj havas tute saman senco: "Kiel vi fartas?" La rusoj ne dancas laŭ piano, sed "sub piano". Veraj akrobatoj! Kiam la svedo venas ien en la lasta momento, oni diras, ke li venis "en la tempo de la grafo", kaj kiam li mortas, oni diras, ke li "iris el la tempo". La estonoj ne metas la ĉapelon sur la kapon kaj la piedojn en la ŝuojn, sed ili metas la ĉapelon "en la kapon" kaj "la ŝuojn en la piedojn"... Certe ankaŭ en via propra lingvo vi povas trovi multajn tiajn perlojn.

Se nun ĉiu popolo laŭvorte tradukus al Esperanto kaj uzus en ĝi siajn idiotismojn, ni ne plu komprenus unu la aliajn kaj anstataŭ internacia lingvo ni havus iun kriptogramon. Tial ne imitu blinde vian gepatran lingvon, ne traduku el ĝi laŭvorte kaj ne postulu ke la internacia lingvo estu en ĉiu detalo simila al ĝi.

Skribu kaj parolu ĉiam simple, klare kaj internacie, por ke ĉiu facile kaj egale vin komprenu. Por tio estas necese, ke vi pensu ne en via gepatra lingvo, sed rekte en Esperanto. Komence tio ja estas malfacila, sed post kelktempa ekzercado kaj praktika uzado de la lingvo vi bone sukcesos.

Por akiri internacian kaj bonan esperantan stilon, oni ne bezonas studi plurajn lingvojn, kiel kelkaj opinias, sed estas nur necese fundamente koni la strukturon kaj spiriton de Esperanto mem. Ilin vi plej bone ekkonos, zorge legante la gazeton kaj literaturon, precipe la verkojn de nia Majstro kaj aliaj bonaj aŭtoroj, kaj interparolante kun alilandanoj.

Tiam vi konstatos ankaŭ tion, ke malgraŭ sia logikeco... la esperanta stilo tute ne estas mekanika, seka kaj senviva, kiel matematika formulo, kiun asertas kelkfoje la kontraŭuloj, sed ke sub la plumo de talenta poeto kaj verkisto, kiu plene estras la lingvon, ĝi povas esti same vivoplena, poezia kaj sukriĉa kiel en kiu ajn alia lingvo. La premiso de tia poezia stilo, kiu donas vivon, koloron kaj elastecon al la lingvo, estas la uzado de diversaj bildaj esprimoj aŭ poeziaj figuroj: *La luno velas sur la ĉielo. Ŝipo naĝas sur la maro. La tuta mondo kunvenis hieraŭ sur la Placo de Libereco. Vespere venas.* kaj tiel plu. Tiaj bildaj esprimoj ne estas la rigore logikaj kaj matematike precizaj, sed kun iom da fantazio ĉiu facile komprenas ilin, egale al kiu nacienco li apartenas. Tial eraras tiuj, kiuj asertas, ke la horloĝo ne povas iri, ke la kaldrono kaj poto ne povas havi orelojn, ke vespero ne povas veni ktp. Ili forgesas, ke la lingvo ne estas matematika formulo, sed ilo por esprimi krom niaj pensoj ankaŭ niajn sentojn.

# Aforismoj, anekdotoj, humuraĵoj...



Ne eblas doni ĉion al  
ĉiuj, ĉar ĉiuj amasas,  
kaj ĉio ne abundas.

Trovis kaj esperantigis  
Tatjana Vŝivceva [Miass, Rusio]


Knedlikov Arkadij [Rusio]  
Esperantigis Belousov Igorj [Engels, Rusio]

## La teroristo

- Hola! Ĉu tio estas polico?  
— Jes!  
— En la lernejo № 3 kuŝas bombo!  
— Jen mi tiros vin je viaj oreloj, friponeto!  
— Pro kio?  
— Ke vi tiel ne petolu!  
— Vere, s-ro oficiro, en la lernejo estas metita la bombo!  
— Kiu estas via nomo, knabo?  
— Viktor.  
— Kaj kie vi trovis la bombon?  
— Mi mem faris ĝin.  
— Ĉu el la papero?  
— En la lernejo estas la bombo!  
— Kion vi parolas? Ĉu hodiaŭ en via lernejo estas kontrola ekzameno?  
— Jes.  
— Ĉu vi ne estas preta por ĝi?  
— Jes!  
— Kaj mi, sekve, devas sendi la taĉmenton de sapeistoj en vian lernejon, kiuj forpelos ĉiujn lernejanojn el la lernejo surstraten, dum du horoj serĉos la bombon kaj ne trovos ĝin. Kaj ĉio nur pro tio, ke vi ne volas plenumi la kontrolan ekzamenon? Ĉu vi komprenas, ke vane maltrankviligas okupitajn homojn?  
— Mi komprenas.  
— Ĉu vi ne hontas?  
— Mi hontas.  
— Pri kiu fako estas via kontrola ekzameno?  
— Matematiko.  
— Ĉu ne ekzistas la ŝanco...?  
— Neniu.  
— Ĉu vi provis ellerni?  
— Jam estas malfrue...  
— Kaj pli frue vi pri kio pensis?  
— Mi ellernos, sed poste.  
— Kiam poste?  
— Hodiaŭ vespere.  
— Vi ja trompas!  
— Mi promesas!  
— Nu, bone. Sed sciu – la lastan fojon!  
— Mi dankas vin, patro, tiel dankas!

## Demandoj kaj respondoj

- Kial koko kokerikas tiel ĝoje?  
— Ĉar havas multajn edzinojn, sed eĉ ne unu bopatrino.  
\*  
— Kiu malsano estas la plej danĝera?  
— La amo, ĉar ĝi tuj enlitigas onin.  
\*  
— Kial pentraĵon oni metas en kadron?  
— Por ke pentristo vidu limojn de pentrado.  
\*  
— Kiom longe vivas averaĝa homo?  
— Ĝis la morto.  
\*  
— Kiun hejman laboron devas fari vera viro?  
— Neniun.  
\*  
— Kio ligas la homon kaj la hundon?  
— La konduk-ŝnuro.



bildo el la revuo "Krasnaja burda"  
Jekaterinburg, Rusio

Kolektis kaj esperantigis  
Prohorov Anatolij [Abakan, Rusio]

### Sprita edzo

Edzino demandas la edzon:

– Kion vi pli amas en mi – mian belan vizaĝon aŭ mian ardan korpon?

– Vian senton de humuro.

\*

### Bedaŭrindas

Certe estas oportune alglui al komputila monitoro paperetojn kun memorigoj pri tio, kion necesas urĝe fari. Estas neoportune nur, ke ili post duonjaro forgluiĝas...

\*

### Timo

En teatro pasas unua prezentado de spektaklo. La reĝisoro nerveze fumas en teatra koridoro. Subite el la halo eliras viro. La reĝisoro lin demandas:

– Nu, kiel estas la spektaklo?

– Bonege!

– Kaj la aktoroj?

– Brile rolas!

– Kial ja vi foriris?

– Ĉar mi timas sola sidi en la tuta salono.

\*

### Indigno

Orkestro provludas. La gvidanto jam la centan fojon igas muzikistojn denove kaj denove ripeti la saman verkon. Tio al li ne tiel, alio ne ĉi tiel... La tamburisto ne eltenas kaj proteste indigne ektamburas samtempe per ĉiuj siaj tamburoj kaj teleroj. Sonas sovaĝa bruoj, ĉiuj muzikistoj ŝtoniĝas kaj atendas... La gvidanto silente ĉirkaŭrigardas la orkestron kaj demandas:

– Nu, kaj kiu tion faris?

\*

### Du amikoj

Renkontiĝas du amikoj.

– Kial vi estas tiom malgaja?

– Veturas mi hieraŭ en metroo, vidas – ege bela junulino sidas... bela vizaĝo, fajnaj kruoj...! Mi pe-toleme palpebrumis al ŝi. Kaj ŝi ekstaris kaj cedis al mi la lokon...

### Konsilo de dantisto

“Memoru, nenio tiel bone defendos viajn dentojn, kiel estiminda rilato al ceteraj homoj.”

\*

### Tre taŭga recepto

Recepto de masko por plibonigi aspekton de la vizaĝo:

“Oni tranĉu brasikon, poste tranĉu pomon kaj ĉion intermiksi en telero. Verŝu oleon, denove intermiksi kaj ĉion formanĝu. La vizaĝo plezure etendiĝos en agrabla rideto kaj ĝia aspekto pliboniĝos”.

\*

### Logiko

Ĉefo al la oficisto:

– Vi jam la kvinan tagon malfruas al la laborejo. Kion mi devas konk-ludi?

– Ke hodiaŭ estas vendredo.

\*

### Konfeso

Junulino al sia amiko:

– Sciu, Vanja, tamen estas en vi io de vera kavaliro...

– Ĉu, vere? Kio do, mia kara?

– La fera frunto!

\*

### Du koŝmaroj

En juvela vendejo.

– Estimata, kiom kostas tiu ringo?

– \$100000.

– Koŝmaro! Kaj tiu braceleto kun brilantoj?

– Du koŝmarojn!

\*

### Atingoj de medicino

Post 50 jaroj medicino atingos tiom altan nivelon, ke ĝi povos kuraci ĉiujn konatajn malsanojn, sed ankaŭ ekpovos malkovri la multajn nekonatajn!

\*

### Samforta partnero

Iu homo ludis ŝakon kun ŝafo. Tion ekvidis lia konato kaj miris:

– Vi ludas ŝakon kun la ŝafo?!?

Ha-ha! Kaj kia estas la rezulto?

– 2 : 2.

\*

### Seksa diferenco

Plej bonaj fakuloj pri vendado estas viroj, pri la aĉetado – virinoj.

\*

### Malakra razilo

Edzo sinrazas antaŭ spegulo kaj diras al la edzino:

– Ial mia razilo malbone razas!

La edzino:

– Estas strange. Hieraŭ ĝi tre bone tranĉis kartonon...

\*\*\*

Esperantigis Andrej Ŝihov  
[Turinsk, Rusio]

### Pensu bone!

Demando en enketilo:

“Ĉu vi ŝatas manĝi?”

kaj variantoj de respondo:

Jes  Ne  Alio

### Per propraj okuloj

Juĝisto:

– Atestanto, vi devas diri nur tion, kion vi vidis per propraj okuloj.

– Mi komprenis, via moŝto.

– Do, kiam vi naskiĝis?

– Bedaŭrinde, mi ne povas respondi – mi tion ne vidis.



bildo de Kornjuhina Anna  
[Barnaul, Rusio]

Teresa Liberska [Pollando]

Teresa Liberska estas lernantino de Boris Kolker, en lia perfektiga kurso laŭ la libro "Vojaĝo en Esperanto-lando"

"Por unu el lecionoj de la kurso mi skribis taskon al la temo: "Verku la artikolon pri via lando tiel, ke la leganto tuj ekdeziru viziti ĝin". Do, mi skribis pri Pollando." B. Kolker donis al mi retadreson de via revuo, por ke mi prezentu mian rakonton ankaŭ al viaj legantoj, kion mi faras kun plezuro".  
**T. Liberska**



Varsovio. Palaco de Kulturo kaj Scienco


**P**ollando, lando en meza Eŭropo, bonvenigas turistojn! Ĉi tie tiuj, kiuj amas maron, povas viziti baltan bordon kun ĉarmaj ĉemaraj urbetoj, kie oni povas sunbruniĝi sur sablo de plaĝo, naĝi en maro, konstrui kastelojn el blanka sablo, manĝi bongustajn fiŝojn, viziti malgrandajn kafejojn, ĝui etoson de ĉarmaj ripozejoj, promeni sur la moleo rigardante marondojn kaj ŝipojn sur la maro. Plej bela moleo, inda por vidi ĝin, estas en urbo Sopot. Ankaŭ ĉarmaj kaj tre ŝatataj de la turistoj estas urboj Kolobrzeg kaj Gdansk. Por tiuj, kiuj ŝatas acetajojn, la vendistoj vendas aĵojn el sukceso. Oni nomas sukceson "oro de balta maro". Se vi havos bonŝancon, tre frue matene vi povas trovi pece-tojn de sukceso en borda sablo.

Tiuj, kiuj ŝatas montaron, ankaŭ trovos ĝin en mia lando. Plej altaj montoj estas ĉe ĉirkaŭaĵo de Zakopane. Tie troviĝas montaro, kiun oni nomas Tatroj. En Tatroj tre interesaj estas lagoj, el kiuj la plej fama estas Mara Okulo. Depende de jarsezono la Mara Okulo ŝanĝas sian aspekton kaj kolorojn. Ĉefe tio estas tre interesa por ama-

toroj de fotografio kaj por profesiaj fotografistoj. En Tatroj vi devas esti atenta, ĉar ĉi tie oni povas renkonti brunajn ursojn. En urbeto Zakopane oni povas aŭskulti montaran folkloran muzikon kaj gustumi lokan manĝaĵon.

Nemalproksime de Zakopane troviĝas la unua ĉefurbo de Pollando Krakovo, kie oni povas viziti la sidejon de polaj reĝoj kaj la plej malnovan universitaton en Pollando - Jagiellona Universitato.

Ankaŭ tre interesa estas la malnova centro de la urbo, kun belaj arkitekturaj konstruaĵoj. Inter ili estas la preĝejo "Mariacki", en kiu troviĝas tre fama ligna altaro de Wit Stwosz (pola fama skulptisto de germana deveno). Kaj je la 12-a horo, en la tagmezo, de turo de ĉi tiu preĝejo oni povas aŭdi la himnon, kiun ludas trumpetisto. La himno estas aŭdebla per la radio en la tuta lando, ĝuste je la 12-a horo tagmeze. Ĉe kafo, kiun vi povas trinki en iu el multaj kafejoj, eble iu loĝanto de Krakovo rakontos al vi interesajn legendojn, ligitajn kun ĉi tiu urbo, ekzemple pri drako, kiu loĝas ĉe bordo de Vistulo sub la reĝa kastelo, aŭ rakontos al vi, kial la melodio de la himno estas rompita - rompiĝas tuj dum ludo, kvazaŭ duonmuzik-note.



Krakovo. Bazara placo

Vi povas viziti ankaŭ Varsovion, la nunan ĉefurbon de mia lando, sidejon de la nuna estraro de la ŝtato. Tie en la unua plano vi povas vidi la Kulturajn Palacon, kiu estis konstruita en 50-aj jaroj de la pasinta jarcento kiel donaco de Stalin al Pollando. Nun en ĝi oni organizas por turistoj multe da

diversaj ekspozicioj, oni povas de ĝi vidi belan panoramon de Varsovio.

Kaj poste mi invitas vin nepre viziti la malnovan parton de Varsovio kun Reĝa Kastelo. Ni povas viziti la reĝan kastelon kaj vidi kiel loĝis iam la reĝoj, kaj kiajn meblojn uzis, kaj ankaŭ vi vidos tie belan kolekton de pentraĵoj de polaj kaj de mondaj pentristoj. En la mezo de la malnova parto de la urbo vi povas promeni per ĉaro kun ĉevaloj kaj eksenti la etoson de iamaj tempoj. Kiam vi sentos vin laca, vin invitos ĉarmaj restoracioj kun bongusta pola manĝaĵo. Kiam vi ripozos, vi povas viziti grandan belan parkon en Varsovio, en kiu troviĝas monumento de Frideriko Chopin. Se estos bela somera vetero, eble vi havos bonŝancon aŭskulti koncerton de iu pianisto en la parko. Poste vi povas viziti la someran reĝan palacon kun belaj ĝardenoj (en alia parto de Varsovio), kiu nomiĝas "Lazienki".

Proksime de Varsovio troviĝas urbeto Ĥelazowa Wola, en kiu estas la domo, kie loĝis kaj verkis malgranda Frideriko Chopin. Ĉi tie ĉiuj aĵoj memorigas pri la familio Chopin kaj pri la komponisto mem. Veturante pli okcidente al flanko de Poznan, vi povas viziti la unuajn urbetojn de antikvaj tempoj, kiuj estis konstruitaj el ligno sur palisoj, ĉe bordo de la lago, fare de la polaj gentoj, antaŭ ol oni formis polan ŝtaton.

Tre interese estas vidi, kiel ĉi tiuj homoj organizis sian urbeton, kiel konstruis la domojn, stratojn, kaj imagi kiel oni vivis tiam. Ĉiujare en septembro oni organizas ĉi tie la historian renkontiĝon por popolo kaj turistoj kaj ĉiu povas mem transformi sin en homon de tiamaj jarcentoj kaj labori kiel ili laboris, prepari manĝaĵojn, kiel oni tion faris, danci kiel ili iam dancis, kaj kapti fiŝojn en la lago, kiel ili kaptis, navigante per la simplaj boatoj, faritaj el trunkoj de arboj.

Se vi ŝatus konstrui tian boaton, vi ankaŭ povas aliĝi al grupo de konstruantoj. Kaj daŭre vojaĝante tra mia lando, iomete al nordo, ni vizitos la urbon de Nikolao Kopernik (fama pola astronomo) - Torun. Tie ni povas viziti la loĝejon de familio Kopernik, fotiĝi ĉe la monumento de la fama astronomo, viziti la astronomian observatorion kaj promeni tra la stratoj, kie iam promenis la fama astronomo. La urbo estas vere bela kaj inda por viziti ĝin. Ankaŭ tre interesa estas alia urbo Malbork, kie troviĝas plej granda kastelo de Krucordeno. La kastelo estas impona kaj montras la arton de tiama tekniko de kastela konstruado. Oni diras, ke ĝi estas la plej granda krucordena kastelo en Eŭropo. Ĉi tie loĝis en la 12-14 jarcentoj la ĉefa estro de la Krucordeno.

Fine por tiuj, kiuj volas jam ripozi de urba etoso kaj ŝatas naturon - arbarojn, lagojn, bestojn, birdojn aŭ ŝatas akvajn sportojn, mi rekomendus viziti la ege belan regionon Mazury, kiu troviĝas en nordorienta Pollando. Krom lagoj, tie estas grandaj arbaroj kun interesaj naciaj parkoj, en kiuj vivas diversaj bestoj kaj birdoj. Plej grandaj bestoj tie estas ursoj, kiuj loĝas nur en kelkaj parkoj en Eŭropo. Mazury ankaŭ estas regiono de kanto kaj muziko. Dum somera tempo oni povas ĉi tie partopreni en diversaj muzikaj festivaloj de diversaj tipoj de muziko kaj kantoj. La festivaloj altiras turistojn de la tuta Eŭropo. Tiuj, kiuj ŝatas historion, povas ĉi tie vidi la unikan faman sidejon de Hitler, kiun oni nomas Wilczy Szaniec (Lupa Reduto) kaj de kiu li ordonis dum la Dua Mondmilito.

En ĉi tiuj paĝoj ne eblas detale priskribi ĉiujn vizitindajn lokojn en Pollando, sed Pollando invitas vin. Bonvolu veni kaj viziti mian landon! La homoj estas gastemaj, la manĝaĵoj tre bonaj, la klimato plezura kaj la pejzaĝoj diversaj kaj tre interesaj!

# Konkurso "Enigmoj-2006"

"Rikolto" = 10 poentoj

Aŭtuno estas tempo de rikolto. Ni proponas al via atento literan kvadraton, en kies kaoso kaŝiĝas vortoj, ligitaj al fruktoj, beroj kaj legomoj. Ĉiuj vortoj situas sendepende de la aliaj, "manovras" ajn-direkten (vidu ekzemplon), sed neniam interkruĉiĝas kaj unu sama litero ne estas uzata pli ol unu-foje.

komplilis Viktor Kudrjavec [Jekaterinburg, Rusio]

t	p	o	m	o	u	r	b	o	o
e	r	a	k	v	k	f	r	a	g
o	r	i	p	o	u	o	o	ĝ	n
n	u	i	e	m	k	m	o	r	a
s	k	o	k	u	k	u	k	p	i
o	t	n	o	t	o	r	a	o	z
o	o	a	n	o	f	r	a	m	b
m	m	m	d	a	n	o	n	a	o
o	a	t	o	r	i	b	a	n	o
p	r	a	p	o	p	r	u	n	o



## Rezultoj de la konkurso el la 3-a numero

Jen estas nomoj kaj gajnitaj poentoj de la konkurso el "K"-3-2006

- 1) **Anton Loŝmanov** [Komsomolsk-na-Amure, Rusio] 4+17 = 21 poentoj
- 2) **Christian Riviere**, [Le Mans, Francio] — 4 poentoj
- 3) **Jackie Huberdeau** [Le Mans, Francio] — ne partoprenis

Korektaj respondoj al la taskoj de la Konkurso el "K"-3-2006

Vortĉeno: HUNDOGORILOKUSTOMAKORDOKOKO  
Proverbo klasika

1. Ne ŝovu la nazon en fremdan vazon.
2. Komenco bona - laboro duona.
3. Al ĉiu besto plaĉas ĝia nesto.
4. Amiko fidela estas trezoro plej bela.
5. Akvo kaj pano servas al sano.
6. Venis prudento, kiam pasis la momento.
7. Sen laboro ne venas oro.
8. Ne kreu al parolo sen propra kontrolo.
9. Ne ĉio utilas, kio brilas.
10. Ne venas rato mem al kato.

Estas interese,

ke en la konkursaĵo "Proverbo klasika" kuraĝis partopreni nur **Anton Loŝmanov** [Komsomolsk-na-Amure, Rusio]. La konkursaĵo estis sufiĉe komplika, tial ni poentigis ĉiun proverbon per 2 poentoj. Anton Loŝmanov divenis ĉiujn proverbojn, krom la 6-a. Lia respondo estis "Kiu demandas, tiu ne eraras". Kaj al la 10-a proverbo li proponis "Fiŝo ne iras, sed hoko ĝin tiras". Ni opinias, ke proponita de li varianta sufiĉe proksimas al korekta solvo, tial decidis aljuĝi al A.Loŝmanov 1 poenton, kio sume donos al li 17 poentojn pro tiu konkursaĵo.

Do, la ĝeneralaj rezultoj de la "Konkurso-2006" momente estas:

- 1) **Anton Loŝmanov** [Komsomolsk-na-Amure, Rusio] — 19 + 21 = 40 poentoj
- 2) **Christian Riviere**, [Le Mans, Francio] — 18 + 4 = 22 poentoj
- 3) **Jackie Huberdeau** [Le Mans, Francio] — = 10 poentoj

## Anoncetoj

## Informoj

## Korespondu!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj kaj 2 eŭrojn por ĉiuj ceteraj. Por abonantoj de "K" - senpage.

Mi estas 33-jara studento de intermacia negoco, progresanto E-te. **Int:** politiko, religio kaj muziko. Min interesas Hispanio kaj Italio.

*Yeheshua OPINCAR*  
2917 Lanier Ct. #203  
Howell, MI 48843

**Usono**

opincar27@yahoo.com

Mi estas 44-jara, mi deziras krei video-filmojn kaj aliajn verkojn en E-to. **Int:** esperanta kaj japana muziko.

*Philip David Morgan*

287 avenuo Cambon  
Saint James,  
Novjorko 11780-2518

**Usono**

pmorgan@suffolk.lib.ny.us

Mi estas 13-jara lemantino. **Int:** moderna muziko, vojaĝoj, modo, afiŝoj de kantistoj, bildkaraj, kalendaroj.

*Dobromira Nepomnjaŝĉaja*

str. Parkova 11-4,  
Krasnojarsk, 660014,

**Rusio**

Mi estas 34-jara fraŭlo. **Int:** fremdaj lingvoj, azia kulturo, rokmuziko, numeraj enigmoj (ekz., sudoku-o), astrologio, vojaĝado.

*Blake Hutchinson*

P.O. Box 1313  
Tatum, TX 75691

**Usono**

blejko1971@graffiti.net

Serĉu  
korespondamikojn ĉe  
[www.Edukado.net](http://www.Edukado.net)

Mi estas 56-jara, budhisma monaĥo. Plaĉus al mi korespondi retpoŝte kun geamikoj el ĉiu kontinento. Via aĝo, sekso, religio kaj kulturo ne gravas. Mi ŝategus lerni pri aliaj landoj kaj samtempe plibonigi mian konon de Esperanto. Mi deziras korespondi pri ĉiutaga vivo, meditado, alilandaj kulturoj.

*Anagarika Adin*  
Great Gaddesden.

**Britio**

5skandhas@gmail.com

Mi estas 54-jara, sufiĉe nova hispana esperantisto.

*Juan Antonio Torres Galan*  
Sevilla

**Hispanio**

Juantoro1@telefonica.net

Mi estas 24-jara viro, progresanto, programisto. Mi instruas Esperanton interrete.

**Int:** bicikli, jongli, faldi origamion, matematiko, artefarita intelekto, kanti, vojaĝi, tranaĝi la interreton. Mi estas tre scivolema.

*Stephan Pakebusch*

Sodener Str. 5  
60326 Frankfurt am Main

**Germanio**

haniball@gmx.net

Mi ŝatus korespondi kun ĉiuj tutmonde. Mi estas fraŭlo el Kanado, 35-jara, esperantisto de 1987. **Int:** naturo, ekologio kaj ĉio alia...

*Martin Lavallee*

Montreal

**Kanado**

martin\_lavallee@yahoo.ca

Mi estas viro 28-jara. Mi praktikas montpromenadon kaj japanan batalarton, ŝategas lerni lingvojn. Mi volus korespondi paperpoŝte ankaŭ.

*Miguel Angel Sanchez*

Camino Verde 101 (Las Mercedes), 38293 La Laguna, Islas Canarias.

**Hispanio**

eomiagel@yahoo.es

Mi estas 33-jara virino. Mi ŝatas rajdi ondajn relvojojn, kaj mi ankaŭ ŝatas triki, ludi komputiluludojn, aŭskulti muzikon, legi fikcion. Mi havas tri katojn. Mi deziras korespondi retpoŝte.

*Penny Nicholas*

Chichester

**Anglio**

dezideratisto@yahoo.co.uk

Mi estas 15-jara knabo. Mi amas lingvojn, teatron kaj filozofion. Mi ŝatus korespondi kun esperantistoj francaj, britaj, hispanaj aŭ italaj, kiuj havas proksimajn interesojn kaj aĝon kiel mi.

*Andreo Peetermans*

Schaliehoevestraat 23  
2220 Heist-op-den-Berg

**Belgio**

super-griek@hotmail.com

Mi estas 20-jara. Mi ŝatas (popolan kaj aliajn) muzikon, religion, literaturon, fotografi, havi amikojn. Mi ŝatas paperpoŝton, ĉar mi neniam ricevis leteron paperan.

*Robin Ronnlund*

Hannebergsgatan 20  
171 68 SOLNA

**Svedio**

komponisto@gmail.com

Mi estas lemantino kaj emas korespondi kun ĉiuj, precipe junaj gesamideanoj, interŝanĝi poŝtbildojn kaj diskuti pri diversaj kulturoj. **Int:** naturo, literaturo, lingvoj, dancludoj, orienta kulturo.

*Marko Nikolic*

Blagoja Parovica 12/78  
Nis

**Serbio**

slumpy@bankerinter.net



**komencanto@r66.ru**

viaj mesaĝoj, verkoj kaj leteroj estas ĉiam bonvenaj!

